

North American
Esperanto Review

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Novembro - Decembro 1961



ESPERANTO RAKETFLUGAS EN PITTSBURGH (vidu artikolo sur p.89)

Esperanto Review

Vol. 9, No 6

Donald Broadribb, Editor
5615 Woodlawn Ave., Chicago 37, Illinois

Founded in 1953 and published bi-monthly by the **Esperanto League for North America, Inc.**, as its official organ. Subscription rates: Regular Subscription \$2.00 per year; gift subscription, \$1.75 per year, or three for \$4.00 per year; bulk orders, ten copies ordered in advance, \$1.50, except for special issues. Membership dues: regular members, \$5.00; supporting members, \$10.00; patron members, \$20.00; life members, \$100; man and wife, each having the privileges of a regular member, but receiving only one copy of publications, \$7.00. Make all checks and money orders payable to "**Esperanto League for North America, Inc.**" Send all payments, orders for subscriptions, and memberships to the treasurer, Jay Berry, 3231 W. 62nd St., Seattle 7, Washington.

Officers of the Esperanto League for North America, Inc.: President - David B. Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington; Vice-President - Charles E. Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California; Secretary - Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania; Treasurer - Jay Berry, 3231 W. 62nd St., Seattle 7, Washington. **Executive Board:** Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas; Mary Gibson, P.O. Box 409, Riverdale, Fresno County, California; Frans J. Jahger, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania; James Lieberman, 24 Claf-lin Road, Brookline 46, Massachusetts; Paul Nace, 1410 Ray Road, Hyattsville, Maryland; Catherine Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, California; H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington, Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California,

SPECIAL EDUCATIONAL ISSUE

Copies of the Special Educational Issue, published in October, 1961, are available at 35¢ each. This "handbook for Esperanto" includes articles on the Origins of Esperanto, Questions Often Asked About Esperanto, Esperanto and the United Nations, Esperanto in the School Program, Esperanto in Religious Work, Esperanto Magazines, a complete guide to the language, a dictionary, information about Esperanto Postage Stamps, How to Learn Esperanto, etc. Use it to give to your friends who inquire about Esperanto, **and** use it to learn more yourself. Order from ELNA treasurer.

PROJECTS FOR AN INTERNATIONAL LANGUAGE

Often persons interested in Esperanto learn that other language projects have also been proposed. The names most likely to be noticed at present are Interlingua, Interlingue and Ido. Occasionally Basic English, Volapük, and Interglossa are also referred to. Several hundred other projects have been proposed at one time or another, but few have actually been worked out and only those named above are of special interest.

Interlingua grew out of research carried on by a private group called the International Auxiliary Language Association (I. A. L. A.). In 1952 a large dictionary, the Interlingua-English Dictionary, was published, followed by a rather technical Interlingua Grammar. A small English-Interlingua Dictionary has subsequently been published. A half dozen small pamphlets have also appeared, and one elementary grammar Interlingua at a Glance.

Interlingua is somewhat more difficult to learn than Esperanto, but easier than Spanish or Italian. Its vocabulary consists primarily of words taken from the Romance languages with little or no change. Spelling is irregular, as is pronunciation. Word formation must be learned for each individual term. Idiomatic phrases are used. Interlingua is not difficult for a person to read without special study of the language, provided he is well acquainted with Latin and one modern, western, Romance language (French, Spanish, Portuguese, or Italian).

Interlingua is extensively used for summaries of technical articles in certain medical and chemical journals. The only printed periodical in Interlingua is devoted to molecular spectroscopy. Several mimeographed bulletins appear. It is estimated that 150 persons in the world speak and write Interlingua.

With a similar name is the project Interlingue (earlier called Occidental, but renamed after the Second World War). This project was formulated by an Estonian, Edgar de Wahl, in 1922. It relies upon word forms taken from the Romance languages, English, and German. The grammar is fairly regular, word derivation is quite irregular.

A 16 page bimonthly periodical, Cosmoglotta, is currently published in Interlingue, along with mimeographed bulletins. No printed textbooks or dictionaries for English speakers are available, but several mimeographed booklets and folders exist. Fluent speakers of Interlingue may number upwards of 500.

Ido is a project published in 1907 as an attempt to introduce changes in the structure of Esperanto. These included: alphabet reform, grammatical reform (elimination, in most instances, of the accusative case, of agreement of adjectives, and of direct word derivation), and vocabulary reform. Ido can easily be read by anyone knowing Esperanto. Between 1907 and 1914 a substantial Ido movement grew.

Ido never received a stable form, but underwent continuous changes. The majority of improvements which it proposed have, over the years, been incorporated into Esperanto. Only about 100 speakers are left. A 16 page quarterly periodical, Progreso, is printed along with mimeographed bulletins. Printed literature from before the Second World War is abundant.

Basic English was an attempt to simplify English by reducing its vocabulary. It grew out of the work of C. K. Ogden and I. A. Richards. In 1947 the rights to Basic English were purchased by the British government.

A series of books based on Basic English was published in the 1940's. Some teachers of English were encouraged to utilize Basic English materials in teaching English to foreign students. No movement for using Basic English as an international language has ever existed.

Volapük was the first serious project for a constructed language. Its author was a German priest, J. M. Schleyer. The first materials on Volapük were published in 1879. A movement numbering upwards of 20,000 persons grew to support Volapük. By 1900 most supporters of Volapük had left the movement. A 4 page quarterly continues to be printed in Volapük in Holland. No other literature is currently available.

Volapük cannot be read without special study. Its word roots are taken mostly from English and German, but are remade according to certain rules. The grammar is quite complex.

Interglossa is a name familiar to many American students because of the enthusiastic description given it in a standard textbook The Loom of Language. As a project, Interglossa was never completed.

None of the projects can be said to be languages, if a language is defined as spoken by a community of persons for purposes of communication. To a large degree, the proponents of Interlingua, Interlingue, Ido, etc., are persons who also know Esperanto but who like to toy with language making. A comprehensive treatment of the subject may be found in the book One Language for the World and How to Achieve It by Mario Pei (New York: Devin-Adair Co., 1959).

Donald Broadribb

INTERLINGUE

It es un facté archi-conosset que li real desfacilitás in li aprension de lingues foren veni ne del plu o minu complicat structura grammatical del concernet idiomas, ma del diferentias fundamental existent inter li manieres expresser se del divers popules. Noi ne solmen es confrontat con li necessitá dar apt equivalentes por li masse de idiotismes propri a chascun lingue, ma noi deve ancor saver far li diferentie inter li locutiones queles benque trahiente lor caractere idiosincrasic resta comprensibil, mem si litteralmen traductet, e tis qui sive choca li sentiment lingual de cert popules. sive reside a omni provas de logic analise.

IDO

Ni esas nun en la felicia situeso, ke ni povas determinar la evo di la tero per explori en la laboratorio; pro to la resultajo esas konsiderenda kom tre fidinda. En la cetera kazi ni laboras per hipotezala premisi, ni esas koaktata laborar per teoriala presupozi, qui advere esas kredinda, ma qui esas desfacila pruvebla.

VOLA PŬK

Löf binon tug gretikün,
löf binon tug nobikün.
Löf legik, löf veratik
vo binon givot sülik.
No flagon dami, lobi,
e pardon valikosi.
Löf binon vo valöpo;
no zogon dredäliko
lo lepönäböp, lä for,
lo datom, riskäd e ror.
Löf leno demon pöfi,
ni stimi, ni diniti.
Löf dranon ini sepül,
löpiodraonon lü sül;
vobedon ai nen spal,
löf jafon süli su tal.

INTERLINGUA

IO CREDE que le studio del
physica avantiata es de
grande valor, sed non pro su
contento factual. Il es le atti-
tude, acquirite plus que instrui-
te, que es importante. Isto in-
clude honestate, autodisciplina,
le habitude de lecturas, un cre-
dentia in principios, un confi-
dentia in le solubilitate de om-
ne problema, un dilection absor-
bente pro su labor -- le meta-
morphose mysteriose que trans-
forma le studente a in un physi-
cista. Io suspecta que un tal
miraculo occorre a omne juveno
qui ha studiate con un maestro.

1962

Annual Congress of ELNA

Why Should You Come to Chicago to Attend ELNA's 10th Convention?

By attending you can make an important contribution to the cause of Esperanto -- even in the most humble capacity, if you have enthusiasm. The success of a convention depends on many factors, not the least of which is an encouraging turn-out of devoted fellow Esperantists. The yearly convention is the heart of Esperanto activities in our country - its reverberations will be felt in every one of them. Come, with your measure of spirit and talent to contribute! Chicago awaits you! Its Esperantists eagerly await you! And the many charms of this great city and vacation center await you! Renew old friendships here!

Plans call for the convention to be held July 6-7-8, 1962, at the Hamilton Hotel, Chicago. The Hamilton Hotel, which accepts all races, reports the following room rates: single room \$7-11, double room \$10-14, twin-bed room \$12.50-17.50. The Convention Fee will be, as usual, \$10.00.

From the Secretary:

Everyone can "do something" to help put Esperanto across in our country by contributing time, money, reports, articles, to our organization and its ESPERANTO REVIEW, according to his ability.

If you do not have time to spend on promoting Esperanto and our League, you can perhaps donate dollars to finance the work of us who donate our time and work. At least you can give us this urgently needed information steadily:

- 1 - News of Esperanto classes and groups of all sizes and kinds.
- 2 - News of educators who know and sympathize with our work.
- 3 - News of talks about Esperanto: radio TV, other groups.
- 4 - Tell us about (send us clippings of) articles, letters, any other reference to Esperanto or related matters, in periodicals, books you read. Give us titles, dates, city.

There is urgent need of persons willing and capable of approaching important persons and organizations to bring Esperanto to their attention and perhaps win their sympathy. We need to know the opinions of such sources.

Of course, everyone can write a short letter to congressmen, clergymen, union officials, mayors, etc. We need to know what you and others are doing in this respect in your locality.

The Apple Tree Press, 2322 Mallery Street, Flint 4, Michigan, has carried our listing in their annual CHASES' CALENDAR OF ANNUAL EVENTS, giving

our address as that of the sponsor of the birthday anniversary of Dr. Zamenhof, founder of Esperanto. Because of this listing (entirely free) many persons and firms send us advertising literature and inquire about Esperanto. Some of the ads are useless to us, but it gives me a chance to politely write to them and impress Esperanto on their mind.

The price of the CALENDAR is only \$1. Order direct or through my address.

URGENTLY NEEDED INFORMATION

Send the following information to the Secretary of ELNA if you've done anything at all for Esperanto in 1961, or if you know about anyone else who did anything:

- 1 - How many articles relating to Esperanto appeared in the press?
- 2 - How many talks were given to how many listeners?
- 3 - How many radio talks, television appearances, displays, posters used, leaflets distributed?
- 4 - Did this activity result in increased interest in Esperanto in your locality, or elsewhere in 1961?
- 5 - Does an Esperanto group of any kind or any size meet regularly or irregularly in your locality? Do you know of any other groups?

This information must be received and recorded every year in order to keep track of the growth of the movement throughout the world. Won't you please make a special effort to get this information for the Secretary to send to UEA?

ESPERANTO RAKETFLUGAS EN PITTSBURGH

La Esperanto-movado antaŭenmarŝas en Pittsburgh, Pennsylvania, Usono kvazaŭ puŝita per raketo. Kiel rezulto de forta propaganda agado pli ol 150 studentoj partoprenis en somerkurso kaj esprimis intencon kontinui en la ĉiama kreskanta Esperantistaro.

La raketo ekleviĝis la 23an de Aprilo 1961 per du-paĝa artikolo en la Pittsburgh-a "Family Magazine", unu el la plej vaste legitaj ĵurnaloj en la okcidenta parto de la ŝtato Pennsylvania. La artikolo pri-skribis la ideon de Esperanto, la lokan klubon (Amikoj de Esperanto) kaj anoncis la planojn de la kursgvidanto, S-ro Frans J. Jahger, por somerkurso de instruado por komencantoj. Preskaŭ tuj, la klubo komencis ricevi petojn por plua informo pri la kurso, mendojn por lernlibroj kaj abonojn al la Tri-ŝtata Esperanto-Bulteno, "Amikeco".

La 5an, 6an kaj 7an de Majo okazis Popolfesto ĉe Syria Mosque, teatro en Pittsburgh, en kiu sin montris la kantoj kaj dancoj de 22 landoj de Eŭropo, Meksiko, Hindujo, Pakistano, Japanujo, k.t.p. Dum la Popolfesto, la klubo, Amikoj de Esperanto, havis budon kie vizitantoj vidis Esperantajn librojn, broŝurojn, bildojn kaj afiŝojn de Unesco. Geklubanoj gastigis kaj klarigis al vizitantoj.

Du semajnojn pli malfrue estis intervjuo dissendita de radiostacio WPIT, Pittsburgh per kiu Pastoro P.J. Ramstad demandis al S-roj Jahger kaj D.H. McClellan, klubano, pri Esperanto kaj la celoj de la Esperanto-movado.

La rikolto de tiuj varbaj klopodoj montriĝis kiam la somerkurso komencis. Unue aranĝita por klasĉambro en Duquesne

Universitato, la amplekso de la kursanaro devigis transloĝon al la Kuracista Centro de Jones & Laughlin Steel Company. Estis tri klasoj semajne kaj unu el la klasoj konsistis preskaŭ tute el geinstruistoj de publikaj lernejoj. La tuta kursanaro estis lerta kaj entuziasma kaj donos novan vivon al la Esperanto-movado.

Ideoj

Por Propagandi Esperanton

Multaj el ni scias ke la plej granda loga kvalito de Esperanto estas ke ĝi solvas la lingvan problemon. Sed klare tion ne komprenas la ordinario. Li diras "Kial mi lernu Esperanton? Ĝi ne utilos al mi."

Por tiu ordinario mi sugestas ĉi tiun logilon: Klubo por Interŝanĝo de Ferioj. Ĉiu esperantisto deziranta partopreni en la Klubo registrus sin en centra oficejo. Li havus la privilegion esti gasto en la hejmo de iu ajn alia registrita membro, ie en la mondo. Interŝanĝe li estus preta gastigi membron.

Kiel gasto, li pagus la efektivan vivkoston. La reguloj pri la kosto, la longeco de vizitoj, kc. devus esti establataj de komitato post zorga esplorado.

Specialaj avantaĝoj:

1. Oni povus viziti fremdan landon, kun prezo ne multe pli alta ol la veturkosto.
2. Oni povus renkonti amikojn en ĉiu lando, kaj vidi lokojn kutime ne vidatajn de la turisto.
3. Oni povus sperti la ĝojon kiu akompanas la praktikan uzon de "fremda lingvo."

Sugestita de Ella Gibson

GOING UP!

Like everything else, ELNA's costs are going up. To meet rising prices our members voted for a change in ELNA's Constitution which authorizes the Executive Committee to adjust ELNA's dues according to need. The Executive Committee unanimously established the following dues, effective October 1st, 1961:

Student Member (under 21)	\$3.
Regular Member	\$5.
Joint Membership (man & wife)	\$7.
Sustaining Member	\$10.
Patron	\$20.
Life Member	\$100.

Your Executive Committee urges all members to enroll in the highest category possible, according to your sense of Esperanto's important mission in the present chaotic world situation. Thank you for your sacrificially generous support!

Armin Doneis, chairman

We need information concerning the Esperanto courses which were taught during the past year in the schools of the U. S. and Canada. If you were connected with such a course, please send a short report to Catherine Schulze, 410 Darrell Road, Burlingame, California. Answers to the following questions are especially desired:

1. How many students were enrolled?
2. Were the lessons officially taught by the school, were they required, and were they during or outside of regular school hours?
3. How long has Esperanto been taught in the school?

Send also the name and address of the school and of the teacher.

Robert Pfenningwerth, germana samideano, serĉas kontakton kun sia nevo Robert Harry Penniworth-Raz, aŭ sia nevino Selma Alwina Player. Se iu konas ilin, bonvolu peti ke ili kontaktu sian onklon ĉe la adreso Görlitzerstr. 19, Hirschfelde, Germanio (DDR)

"Lernu Per Distraĵo" estas interesa, mimeografita broŝuro preparita de Ida Bella Craig. En ĝi estas kantoj, ludoj, dancoj, simplaj drametoj, ĥoraj legaĵoj, mikspoto, esprimoj por afera kunsido. Ankoraŭ haveblas ekzempleroj de ĉi tiu alloga verko, ĉe la aŭtoro (5631 Balboa Circle, Sacramento, California). Prezo, \$1.

Correction: In the listing of Local Addresses in the Special Educational Issue, please note that the address for Santa Barbara is no longer valid. Also note that the representative for the I. L. E. I. is no longer George Falgier but Dorothy Holland.

MARRIAGES

BROADRIBB-DUNHAM — Rosemary Dunham of Lombard, Ill., to Donald Broadribb, at the Fifty-Seventh Street Friends Meeting, Chicago, Ill., on Sept. 3.

De inko al ŝinko

De MARJORIE BOULTON

La Destino ordonis, ke mi estu verkistino. Pri mi kiel kuiristino, ĝi nenion diris. Tamen, ĉar homoj, kiuj ne bezonas manĝi, estas iom maloftaj, kaj mi ne troviĝas inter tiuj, mi sufiĉe ofte forlasas daktilojn (prosodiajn) por farĉi daktilojn (fruktajn), rezignas al trojoj por ekkrei kun tripoj, ĉesas varmigi miajn vortojn en la forno de mia koro, por ke mi baku miajn tortojn en la forno de mia kuirejo.

Eĉ en la kuirejo mi kelkfoje pensas pri gramatiko. Ekzemple, ni ĉiuj scias, ke -ita signifas pasintecan kaj -ota, estontecan; sed tion mi ofte pliklarigas: ĉar ĉe mi, kiam en la pasinteco estis fritado, ofte en la estonteco devos esti frotado. Ĉu aliaj same ofte brulmakulas siajn patojn? Ĉu por aliaj la vokaloj tiel konfuziĝas, ke kelkfoje la fiŝaĵo iĝas fuŝaĵo kaj oni facile kredus, ke en la gulaŝo estas galoŝoj?

Sed, unufoje ĉiujare, en mia hejmo, mi entreprenas vere seriozan kuiradon, kaj **dediĉas** al ĝi tiom da atendado kaj krea forto, kiom mi dediĉus al artikolo. Tio estas, kiam mi preparas por mia familio nian kristnaskfestan vespermanĝon. De kiuj konsistas mia familio? Ĉe tiu festmanĝo, ĝi konsistas el: unu patrino, tri fraŭlinaj onkloj, unu iasence adoptita fratino (kroata), ŝia edzo (makedonia) kaj unu kato (siam), kelkfoje kun mia baptopatrino. Antaŭ kelkaj jaroj, mi malprudente lasis ilin sciigi, ke kiam mi dediĉas mian plenan atenton al la tasko, mi kapablas prepari festregalon eĉ bonan; kaj ek de tiu malsaĝa sinperfido, estas ĉiam mi, kiu preparas nian decembran festregalon.

Ekzistas tradicia angla menuo por kristnaska festregalo: rostita meleagro kun korektaj akompanaĵoj, kaj angla kristnaska pudingo, kiu estas densa, peza, sed tre bongusta miksaĵo kun multaj sekigitaj fruktoj; oni surverŝas brandon kaj enflamigas la pudington, hu! tre bele. Aliajn pladetojn oni proponas, antaŭe kaj poste.

Sed la tradicia menuo angla estas la sola kiu al mi restas absolute malpermesita. De mi la familio atendas menuon aparte originalan. Precipe la tri onkloj deziras surprizon, ion, pri kio ili povos babilu poste. Sur la tablo estu ia spektaklo kulinara. Sed, post kelkaj jaroj, mia kulinara fantazio komencas elĉerpigi. Mi jam preparis diversajn kvazaŭ mitologiajn klasikajn pladojn, pri kiuj ili aŭdis, sed kiujn ili ne antaŭe gustumis. Mi jam trovis diversajn ekzotikaĵojn el diversaj landoj, kaj traserĉis receptlibrojn por pladoj, kiuj estos samtempe surprizoj, kaj por la familio manĝeblaj. (Ekzemple, bakita hundo certe estus surprizo, sed mi tre dubas, pri ĝia sukceso kiel festplado.)

Tial, iom antaŭ la kristnaska festo, 1960, mi decidis, ke mi bakos ŝinkon. Dum kelkaj jaroj mi milde deziris lerni, kiel baki ŝinkon kun bruna sukero kaj kariofiloj, ĉar mi jam gustumis tranĉaĵojn el ŝinko, tiel preparita, kaj ĝi ŝajnis al mi viandoplado por la dioj.

Nu, kaj tamen kiam mi mendis ĉe londona manĝaĵa vendejo la plej malgrandan ŝinkon, kiun ili kutimas vendi, mi iom forgesis pri la dimensioj de nia dometo, de nia kuirejo, de niaj kaseroloj kaj de nia bakforno. Mia patrino montris grandan intereson pri mia projekto, sed ankaŭ ŝi verŝajne iom forgesis pri la dimensioj almenaŭ de matura porko.

Kiam nia ŝinko alvenis, ĝi estis elegante vestita en eksterordinare malpura paktolo, kiun la poŝtistoj certe ofte faligis dum la vojaĝo. Ĝi ankaŭ portis lastmodan kravaton el dika kaj malpurega ŝnuro. La poŝtisto sidigis ĝin sur la tablon en nia koridoro. Panjo kaj mi rigardis la malbelan pakaĵon dum kelkaj minutoj. Evidente, la unua paŝo en la projekto estis, porti tiun pakaĵon en la kuirejon. Mi levis ĝin. Mi certigas, ke iu, kiu antaŭe aĉetis ŝinkon nur po ducentkvindekgramaj aŭ eĉ centdudekkvingramaj tranĉaĵaretoj, tute ne povas imagi la pezon de tuta ŝinko, eĉ kiam ĝia grandeco estas minimuma. Rapide faliginte tiun vastan viandopecon sur la kuirejan tablon, anhelinte ĝis mi retrovis mian forton, mi serĉis ĉizojn kaj iom liberigis la ligitan ŝinkon. Kiam finfine mi estis malvolvinta la ŝnuron kaj paktolon, mi trovis ŝinkon, iom malpuran, sed certe fidindan, aŭtentikan ŝinkon, kiu odoris surprize bone. Mi malsekigis tukon kaj viŝis la surfacon. Videbla estis la plibonigo. Per kuireja pikilo ni provis la neputrecon de la interno. Tute kontentiga estis la rezulto.

Do, tie, en nia kesteteca kuirejo, antaŭ nia skatoleca bakforno, Panjo kaj mi mediteme rigardis proksimume ses kilogramojn da viando. Ni ne dubis pri la eblo, ĉion utiligi sen malŝparado; ŝinko ne rapide putras; ni havas plurajn malriĉajn najbarinojn, al kiuj ni jam planis donaci bonajn tranĉaĵojn; kaj ni mem estas dotitaj per bonaj apetitoj. Sed unue ni devis prepari ĝin.

Mi pli bone viŝis ĝin, turnis ĝin tien kaj reen, miris pri la bonega odoro. Laŭ mia receptlibro, la sekvonta ero sur la tagordo estis, ke mi trempu la ŝinkon en malvarman akvon, por ke la superflua salo forsolviĝu. Meti objekton en la akvon ne ŝajnas malfacila procedo. Sed: mankis en nia domo pelvo sufiĉe granda; mankis ia poto aŭ sitelo sufiĉe granda; kaj ni ne povis lasi ŝinkon en nia lavtrogro dum la preskribitaj dudekkvar horoj; tiel ni ne povus en la kuirejo lavi la manojn, la vazojn, aŭ eĉ la tukon, per kiu mi viŝis la ŝinkon.

Finfine mi iris al la supra etaĝo, kaj metis la ŝinkon en nian bankuvon, ligante ĝin per dika ŝnuro al la malvarmakva krano. Kaj dum unu tago, ĉiu festsezona vizitanto, kiu petis permeson uzi la banĉambrojn, miris pro la ŝinko, kiu ripozis trankvile en la bankuvo, ligite al la krano, kiel ŝipo per kablo ligita al kajo.

La kato preskaŭ frenezigiĝis. Ĝi flaris viandon. Sekvante la odoron, ĝi trovis viandopecon tiel grandan, ke eĉ la sonĝoj de manĝema kato ne povus bildigi ĝin. Sed ĉirkaŭ tiu insulo de feliĉo brilis malvarma akvo. La kato faris gimnastikon, algrimpis la ŝnuron, metis piedon al la ŝinko - plaŭd! miaŭ! malvarma akvo ne plaĉas al katoj. La besteto daŭrigis sian lertan manovradon, provis de alia direkto; plaŭd! miaŭ! kaj ade kaj ade. Kiel pantero la kato paŝadis ĉirkaŭ la bankuvo, ornamante la randon per elegantaj grizaj makuloj. Ĝi rondiris kaj rondiris, ĝis mi ricevis vertiĝon nur per rigardado; eble ĝi esperis per hipnotigo saltigi la ŝinkon el la akvo.

La sekvonta procedo estis kuirado de la ŝinko en granda kaserolo, dum longa tempo. Tiam nova demando stariĝis: ni ne havis sufiĉe grandan kaserolon. Finfine ni trovis grandan, iomete rustmakulitan senkovrilan kaldronon, kiun, antaŭ multaj jaroj, mia patrino uzadis por fari marmeladon. Ni ŝtopis la kompatindan ŝinkon en tiun ujon ĝis ĝia pozo pensigis pri la antaŭnaskiĝa vivo. Sed tro granda parto ankoraŭ montris sin super la rando de nia kaldrono.

“Kradrostita ŝinkaĵo por la vespermanĝo hodiaŭ!” mi bataalkriis, kaj armis min per nia plej granda tranĉilo. Kiel bone la tranĉita ŝinko odoris! Tamen mi ne kuraĝus proponi ĝin krudan ĉe nia festmanĝo. Du grandegajn, mirinde bongustajn tranĉaĵojn ni ja manĝis tiuvespere, kradrostitajn, kun saŭco kaj legomoj. Sed eĉ post tiu malpligrandigo, la ŝinko restis iom tro granda por la kaldrono.

Festsezonaj vizitantoj, kiuj serĉis nin en la kuirejo, rimarkis, ke sur la gasforno staras kaldrono, kaj el la kaldrono la osteca parto de ŝinko, ligita per ŝnuro al nia krada telerbreto, por ke ĝi ne perdu la ekvilibron, rigardas nin.

La kato translokigis al la tabulo ĉe la lavturo, kaj fiksrigardis la ŝinkon optimisme.

Dum la ŝinko sidadis iom nekomforte en la akvo, mi devis kuri tien kaj reen en preskaŭ la tuta domo, ordigante kaj aranĝante, trovante kaj kunmetante, ornamente kaj pakante, diversajn objektojn por nia kristnaska festo. Por ke mi ne ĝenu Panjon aŭ la najbarinojn, mi demetis miajn ledajn ŝuojn kaj surmetis miajn kroatajn pantoflojn el mola ledo kaj tradicia lana trikaĵo. Tiel dampite, mi faris miajn diversajn taskojn sen multa bruo, ofte revenante al la kuirejo por inspekti la ŝinkon kaj la gardostarantan katon.

Poste - laŭ la receptlibro - ni devis lasi la ŝinkon en modere malvarma loko ĝis ĝi malvarmigis en la akvo.

Tio estis la plej facila tasko, ĉar la ujo estis jam trovita.

Mi komencis depreni la kaldronon, forgesante, ke la ŝinko estas ligita al la telerbreto, kaj nur lastmomente rimarkis mian eraron. Poste, mi dankis al la kuirejaj dioj, ĉar, demetante tiun tre pezan ujon kun ĝia enhavo sur nian kuirejan plankon, mi verŝis sur la gasfornon nur relative malgrandan inundeton da ŝink-akvo. La kaldrono staris trankvile sur la planko; mi metis la katon en alian ĉambron; kaj ĉio iris bone, ĝis mi rapidis en la kuirejon por trovi glason aŭ ion, iris senatente al la ŝranko, kaj peze paŝis en la bone salitan ŝinkakvon. Mi ne scias, ĉu mia kroata pantoflo iom kontribuis al la gusto de la ŝinko; sed la ŝinkakvo ne plibeligis la pantoflon.

Poste, meti la ŝinkon sur la tablon, kie ĝi similis al paciento atendanta ĥirurgon, kaj depreni la haŭton. Tiu tasko estis neatendite facila. Dum kelkaj minutoj ĉio iris laŭ la ortodoksa recepto. Mi senhaŭtigis la ŝinkon, iom bonordigis la formon per tranĉilo, premfrotis brunan sukeron en ĝin, enfiksis kariofilojn je ducentimetraj intervaloj, kaj fiere rigardis mian kreitaĵon. Tiumomente, mia patrino eniris la kuirejon kaj tuj komparis la kariofil-ornamitan ŝinkon al al iu meritplena, eminenta Esperantisto, kiu estas iom ampleksa, se nur li havus variolon!

Sed post la kariofilado venis la vera problemo. Ni devis poste baki la ŝinkon, ofte malsekigante ĝin per cidro. Ni ne havis ujon sufiĉe grandan.

Ni esploris inter niaj diversaj vianduĵoj, sed vane, vane. Finfine ni trovis solvon, sed kian solvon! Nun, kiam la tuta ŝinko estas jam antaŭ multaj monatoj formanĝita, mi kuraĝas konfesi, ke ni bakis nian ŝinkon en ujo kiu, kiam la kato estis katido, apartenis al ĝi, ne por baki, sed por kataj bezonoj. Ni bone lavis la ujon, kaj eĉ uzis desinfektilon. Ni tre konscias pri higieno.

Poste la bakforno montris sin ne sufiĉe granda por ricevi la ŝinkon en la ujo. Mia patrino solvis tiun problemon, forprenante la ordinarajn kradbretojn el la forno kaj enmetante ian improvizan aranĝon, kiu tre bone subtenis la ŝinkon dum duono de la baktempo.

Tiam la tuta improvizaĵo subite falis en la varmega forno, brua kiel bombo, kaj ŝutis cidron ĉiudirekten; sed mia pacienca patrino atendis ĝis ĉio estis sufiĉe malvarma por esti tuŝebla, kaj poste rearanĝis la improvizaĵon. Dume, la kato gardostaris optimisme antaŭ la bakforna pordo.

Finfine, inter bonegaj odoroj de viando, kariofiloj kaj cidro, inter kvar kataj piedetoj kaj kvar iom lacaj kaj malpuraj virinaj manoj, la ŝinko estis preta, bakita, perfekta; kaj ni translokigis ĝin al deca pladego. Ĝi gustis bone, vere bonege. Fakte, familianoj, gemikoj kaj najbaroj manĝis la tuton dum kelkaj tagoj. Mi sentis min krea artisto, preskaŭ same kiel post la lasta frazo de novelo aŭ poemo

Tamen, mi ne facile forgesos la reagon de mia familio, kiam mi fiere portis la pezan ŝinkon en la manĝoĉambron. Unue, grandajn okulojn; due, malfermegitajn buŝojn; kaj poste, mia onklino Hilda, kiu volonte legas pri politiko, volis ekigi demonstracion, ĉar ŝi ekkrus sloganece, batante la tablon:

“Ni volas la tutan porkon! Ni volas la tutan porkon!”



BILL WALKER

Klarigo de maloftaj vortoj:

anheli, malfacile kaj forte spiri (angle: pant. france: haleter)
 ĉizozo, tondilo por drato aŭ metalo (a.: wire-cutters. f.: cisailles)
 daktilo, 1. bongusta frukto de daktilarbo (a.: date. f.: datte). 2. verspiedo, konsistanta el unu longa kaj du mallongaj silaboj (a.: dactyl. f.: dactule)
 farĉo, hakita kaj spicita viando, legomaĵo aŭ fruktaĵo por enmeti internen de manĝaĵo. (a.: stuffing. f.: farce)
 kariofilo, najloforma kaj sekigita florburĝono uzata kiel spicaĵo. (a.: cloves. f.: clou de girofle)
 kulinara, rilata al kuirado kaj preparado de manĝaĵoj. (a.: culinary. f.: culinaire)
 pato, malprofunda, senkovrila kaserolo kun longa tenilo, servanta por friti. (a.: frying pan. f.: poêle)

prosodio, arto aŭ studo de versfarado.

(a.: prosody. f.: prosodie)

tripo, manĝebla intesto de bestoj.

(a.: tripe. f.: tripe)

tropo, metaforo, stila figuro.

(a.: trope. f.: trope)

variolo; infekta malsano, karakterizata de

febzo kaj postuloj sur la haŭto, lasantaj

cikatretojn. (a.: smallpox. f.: variole)

vertiĝo, kaptuniĝo pro sento pri senkvi-

libriĝo. (a.: dizziness. f.: vertige)

La rakonto 'De inko al ŝinko' estas surbendigita de Vilma Eichholz kaj havebla per la Magneto-fona Servo de UEA, Box 344, Oakville, Ont. Daŭro 25 minutoj. Rapideco: 9,5cm/sek. Sur la dua flanko de la sonbendo Vilma Eichholz prezentas instrue 'Vintraĵojn kaj kristnaskajn kantojn. Daŭro 17 min. Rapideco: 19 cm/sek. Prezo sur nova sonbendmaterialo: \$ 3.35.

Otelo, La Maŭro de Venecio, de William Shakespeare, tr. Reto Rosetti.
Eld. Stafeto, La Laguna, 1960. 207 p. Broŝurita. Prezo: \$ 2.25.

La arto verki dramon per versoj kiuj fluas, kiujn oni povas legi kvazaŭ normalan paroladon, estas arto preskaŭ perdita. Oni memoras ke T. S. Eliot longe serĉis mastri ĝin en siaj dramoj, kaj kelkloke sukcesis. La tasko estas duoble malfacila: la arto verki dramojn verse estas preskaŭ malaperinta; kaj la teatro-vizitantoj malfacile komprenas "torditan" paroladon de la rolantoj.

Sed la parolado en Otelo ne estas tordita. Anstataŭe, ĝi fluas tiel nature kaj klare kiel provo. Rilate al tio, mi ne hezitas nomi ĝin la plej sukcesa el la ŝekspiraj tradukaĵoj en nia lingvo.

Kredeble ĉiu kiu legos Otelon jam legis ĝin antaŭe, aŭ en la originalo angla, aŭ en traduko alilingva. Ne necesas diskuti ĝiajn temojn, aŭ rekomendi ĝian legiĝon.

Jen Aŭstralio

Ĉi tiu 25-minuta, kolora, sonfilmo esperante parolanta estas prunteprenebla en Usono. Jen la reguloj por pruntepreni ĝin, senpage:

1. Uzu ĝin nur per 16-mm. son-projektileto bonstata (se la filmo estos difektata dum vi uzos ĝin, vi devos pagi).

2. Resendu la filmon tuj post la projektado.

3. Konkize raportu pri la dato, loko, grandeco kaj karaktero de la rigardintaro.

4. Se vi volas ke la rigardantoj havu la tekston de la filmo antaŭ si, vi devos mem provizi ĝin. (la teksto okupas sep foliojn.)

5. Interesataj personoj kaj grupoj bv. kontakti la sekretario de ELNA, Conrad Fisher, dirante por kiu dato ili volas la filmon.

Agoj de la Estraro

La Estrara Komitato unuanime akceptis kaj aprobis:


(62 - 1) Ke ELNA plialtigu la kotizojn laŭ la nova tarifo anoncata aliloke en tiu ĉi numero de la REVUO, konforme kun la referendumo balotado konstitucia.

(62 - 2) Ke Armin Doneis servu pluan jaron kiel Estro de la Estrara Komitato.

(62 - 3) Ke ELNA akceptu kun danko la inviton kongresi en Chicago en 1962.

(62 - 4) Ke la ELNA 10-a Kongreso okazu en Hamilton Hotelo en Chicago, Ill. de la 6a ĝis 8a de julio, 1962, kun kongreskotizo de \$ 10.

ANNOUNCEMENT VITAL TO EVERY ESPERANTIST IN THE
U.S.A. - IN OUR NEXT ISSUE. DON'T MISS IT.



NOVAJ LIBROJ

Estas signo de nia epoko, ŝajne, ke la literaturoj de la mondo - ankaŭ la Esperanta - koncernadas sin pli kaj pli kun sociaj-filozofiaj demandoj, kies signifoj kaj gravecoj ne plu estas la fako nur de la erudiciaj anoj de iuj apartemaj ismoj, sed havas eĉ viv-aŭ-mortan signifon por la tuta homaro. Ĉi tiun temon traktas, el diverseco de vidpunktoj, almenaŭ tri lastatempaj libroj en Esperanto. Ĝin traktas plej klasike la 262-paĝa Fermentario de Carlos Vaz Ferreira, tradukita tre kompetente en belan Esperanton kaj eldonita de Urugvaja Esperanto-Societo.

Fermentario konsistas el aro de mallongaj kaj longaj eseoj pri temoj, kiuj rangas de "sano" tra "la religioj kaj la homoj" al "psikologio de la genieceo", kaj kroniĝas ĉe la fino per pensiga kaj trafa diskuto: "Kia estas la morala signo de la homa maltrankvilo?" La ideoj de la verkinto pri tio, kio okazas al la homaro en la nuna jarcento, kaj timigas kaj esperigas (sed nur iom).

La foje pedante-sonantaj titoloj ne malemigu vin al legado de ĉi tiu in teresa sed senŝaŭma libro.

De la alia globoflanko venas Malsata Ŝtono, kolekto de rakontoj de la hindo, Rabindranath Tagore. Liaj verkaĵoj priskribas por ni kulturon de la popoloj de Hindujo, kaj la etoson tie regantan, dum la jaroj de ĝia longa, agonja (kaj nefinite ankoraŭ) metamorfozo. Sed temas pri kvietaj skizoj, en kiuj videbliĝas ankaŭ universalaj veroj pri la homo, kie ajn li troviĝas.

Malsata Ŝtono estas la unua libro en serio "Oriento - Okcidento" sub la aŭspicioj de U. E. A., publikigita de Eldona Societo Esperanto en Malmö. Ĝi havas 128 bele presitajn paĝojn kaj estas ilustrita. La tradukon faris nia sperta samideano Lakshmiswar Sinha, kiu jam tra la jaroj riĉigis nian literaturon per kvin aŭ ses tre kompetentaj volumoj.

La saman temon traktas tute alie la "furorlibro", Tragedio en la Universo pri kiu jam tiom estas presite. La verkintoj, famaj "junaj astronomoj" en Zagreb, traktas ĝin plej realisme kaj senpere laŭ ĝiaj plej timigaj aspektoj de fikcia sed, Dio helpu nin, nur tro ebla (kaj ne tro fora morgaŭo). La kataklismon kaj ĝiajn konsekvencojn ili priskribas kun la realeco de ŝtonkrevigilo, tiel ke la demando jam malsuprenvenis de la nebulaj eburturoj kaj tradukiĝis en brulantan karnon kaj la fajrecan pereon por ĉiam kaj eterne de ĉio - ne nur la homo, sed ankaŭ liaj kulturo, arto, moralo - ĉio.

Tra ĉi tiuj tri libroj, kiel en granda parto de la hodiaŭa literaturo, iras komuna fadeno, kiu estas la paradoksa demando: kial la homaro, ju pli scianta ĝi fariĝas, fariĝas ankaŭ des pli malsaĝa? kial, ju pli kreskas inter la homoj komprenemo por rebati la malnovajn antaŭjuĝajn barilojn pri raso, nacieco, k. c., despli grandiĝas inter ili la bariloj plej artefaritaj el ĉiuj, nome, la nacipolitikaj? kial, ju pli grandiĝas nia kapablo plibonigi la staton de la homo individue, des pli ni dediĉas nin al lia detruo kolektive?

Ĉu do en la homara evoluo, kiel en la vivo de la plej simpla kreskanta estaĵo, la maturiĝo deve signifas samtempe la komencon de la dekadenciĝo - kaj la morto?

Nu, la finan respondo al tiu demando ni ne trovos en la cititaj libroj, sed en ĉiu el ili ni trovas almenaŭ etan parton de la respondo, kaj tio helpas iom. Eĉ guto malgranda

David Richardson

Ni Rekomendas

DAILY MAIL BILD-LIBRO PRI BESTOJ

La nova libro elektita por speciala rekomendo ĉi-monate estas la ĵusaperinta Daily Mail Bild-Libro Pri Bestoj. Eld. Associated Newspapers Limited, Londono. 76 p., 32x26 cm., bindita per tre fortika kartono. Prezo \$ 3.00.

Pli kaj pli ofte aperas libroj por infanoj en Esperanto. Ni jam disponas pri pluraj tre allogaj kaj bonaj libroj por nia junularo - la belega Martin Krpan estas ekzemplo speciale menciinda. Por la tre juna infano, bezonataj estas libroj kun kolora bildaro kaj nemulta teksto kiun la leganto povas facile interpreti por la infano. La Bild-Libro pri Bestoj estas eble la plej ambicia kaj grava tiuspeca eldono ĝis nun.

La libro povas servi por la nelegkapabla infano. La infano povas, sur la sino de la patro aŭ patrino, sidi kaj rigardi la kolorplenajn bildojn dum la patr(in)o interpretas la tekston - nomate la beston kaj dirante kie ĝi loĝas kc. Pli aĝa infano, kapabla legi, povas lerni la elementojn de simpla zoologio, por komenci aktivan interesigon pri la besta regno. En ĝi estas ne nur la multekonataj dombestoj sed la centoj da ekzotikaj kaj neofte trovataj bestoj de nia mondo. D.R. Broadribb

Nia Korpo, Anatomio kaj Fiziologio de la Homo por Laikoj, de Seiho Nishi. Gunma Esperanto-Societo, Maebaŝi (Japanujo), 1961. 106p. 21x14.5 cm. Broŝurita.

Ĉi tiu verko estas preparita de emirita profesoro de la Universitato de Tokio. Kvankam la libro nomigās "por laikoj," ĝi ne estas facila legaĵo, sed lernolibro detala kaj sufiĉe profunda. Per ĝi la studanto akiras klaran komprenon pri la homa fiziologio, sed nur per zorga lernado de nomoj, kaj aliaj detaloj. DRB

Liliputo - La Unua Vojaĝo de Gulivero, de Jonathan Swift, tr. Ethel M. Prent. Eld. de Frank Maitland, Londono, 1961. 63p., 18 1/2 x 12 cm, Broŝurita. \$ 1.00

La libro estas valora satiro politika kaj socia. Pro tio, estas bedaŭrinde ke ni kutime uzas ĝin nur kun "purigita" teksto kiel infanlegaĵo. Sed eble tio estas simp-tomo pri la malsano kiu tiel forte atakas nian socion kaj malebligas al ĝi ridi pri si mem. Trafe la aŭtoro de la antaŭparolo sugestas "La lukto pri la ĝusta metodo malfermi manĝotan ovon spegulas la lukton inter protestantoj kaj katolikoj kaj inter la diversaj sektoj. (Se la leganto de la eldono en Esperanto ne atentos, li komencos pensi pri la disputoj pri -ujo kaj -io aŭ -ata kaj -ita.)" Ne nur personoj de pasinta epoko povas profiti per ĉi tiu libro. DRB

NAJLA BULJONO

de Ella Gibson & Bruce Kennedy

Iam en Hispanujo estis vagabondo. Lia nomo estis Pablo. Unu vesperon piedirante laŭ kampara vojo, Pablo vidis rustan najlon sur la vojo. Li klinis sin kaj prenis ĝin el la polvo. "Nur rusta najlo," diris li, "sed eĉ rusta najlo estas pli bone ol nenio." Li metis ĝin en sian poŝon.

Fine li venis al vilaĝo. Li estis laca kaj malsata. Irante al la unua dometo, li frapis sur la pordo.

Post momento maljuna virino malfermis la pordon. "Foriru!" ŝi ordonis. "Petistoj ne estas bonvenaj."

"Mi estas maljuna kripla soldato," diris Pablo, "kaj mi ege bezonas dormejon."

"Ne gravas," diris la virinaĉo, "Vi ne povas dormi ĉi tie. Mi mem povus uzi helpon. Mi ne havas eĉ unu panpeceton en la domo." Ŝi komencis fermi la pordon.

"Sed ni ambaŭ estas homoj," diris Pablo. "Ni devus helpi unu la alian. Permesu al mi dormi sur la planko nur ĉi-nokte kaj morgaŭ matene mi iros."

La maljuna virino akceptis tion.

Kiam Pablo eniris la domon li povis vidi ke la virinaĉo ne estis tiel malriĉa kiel ŝi pretendis. Do li diris, "Ĉu mi povus havi kruston da pano kaj tason da teo?"

"Certe ne," respondis la virinaĉo, "Mi jam diris al vi ke mi ne havas eĉ unu peceton en la domo."

Nun Pablo havis lertan ideon. "Kompatinda vi," li diris, "vi devas esti malsata. Do, mi invitos vin manĝi kun mi."

Once upon a time, in Spain, there was a tramp. His name was Pablo. One evening, walking along a country road, Pablo saw a rusty nail on the road. He bent and picked it out of the dust. "Only a rusty nail," said he, "but even a rusty nail is better than nothing." He put it in his pocket.

Finally he came to a village. He was tired and hungry. Going to the first cottage, he knocked on the door.

After a moment an old woman opened the door. "Go away!" she ordered. "Beggars are not welcome."

"I am an old crippled soldier," said Pablo, "and I greatly need a place to sleep."

"No matter," said the old woman, "You cannot sleep here. I, myself, could use help. I do not have even a crumb of bread in the house." She began to close the door.

"But we are both human beings," said Pablo. "We should help one another. Permit me to sleep on the floor only this night, and tomorrow mornig I will leave."

The old woman agreed to this.

When Pablo entered the house he was able to see that the old woman was not as poor as she claimed. So he said, "Could I possibly have a crust of bread and a cup of tea?"

"Certainly not," answered the old woman, "I have already told you that I do not have even a piece in the house."

Now Pablo had a clever idea. "Poor you," he said, "You must be hungry. So, I will invite you to eat with me."

“Pro Ĉielo,” mokis la virinaĉo,
“Kion petisto povus havi?”

“Donu al mi feran poton kaj mi
montros al vi kiel fari bonan buljonon,”
diris Pablo.

Do la virinaĉo alportis la feran poton.
Pablo plenigis ĝin per akvo, kaj metis
ĝin super la fajron. Poste li prenis la rus-
tan najlon el sia poŝo kaj metis ĝin en la
bolantan akvon.

La virinaĉo rigardegis. “Kion vi
faras?” ŝi demandis mire.

“Najlan buljonon,” li respondis,
kirlante la akvon per la ligna kuleŝo.

“Estas io pri kiu malriĉuloj devus
scii,” diris ŝi, “kaj mi volas lerni kiel
ĝin fari.”

Do la virinaĉo staris tre proksime kaj
estis tre observema. Pablo kirlis kaj kir-
lis la najlon en la bolanta akvo. “Ĉi tio
kutime faras bonan buljonon,” diris li,
“sed ĉi tiun fojon ĝi estos iom maldensa,
ĉar mi uzis la saman najlon dum la tuta
semajno. Se nur mi havus plenmanon
da avenfaruno por meti en ĝin, tio helpus.”
Li sopiris laŭte. “Sed kion oni ne havas,
oni devas ne pripensi.”

“Eble mi havas iom da avenfaruno en
la kuirejo,” diris la virinaĉo. Ŝi iris tien
kaj revenis kun plenpelvo da plej bona
avenfaruno.

“Dankon,” diris Pablo. Li metis
la avenfarunon en la bolantan akvon.
Li kirlis kaj kirlis. La virinaĉo rigarde-
gis. “Baldaŭ la buljono estos preta.
Ĝi estos bona, sed se nur ni havus kel-
kajn cepojn ĝi estus preskaŭ sufiĉe bona
por gastoj.” Li sopiris laŭte. “Sed kion
oni ne havas, oni devas ne pripensi.”

“Eble mi povas trovi kelkajn cepojn.”
La virinaĉo iris al la kuirejo. Ŝi revenis
kun multaj malgrandaj cepoj.

“For heaven’s sake,” mocked the old
woman, “what could a beggar possibly have?”

“Give me an iron pot and I will show you
how to make good broth.” Said Pablo.

So the old woman fetched the iron pot.
Pablo filled it with water and put it on the fire.
Then he took the rusty nail from his pocket
and put it in the boiling water.

The old woman stared. “What are you
making?” she demanded, with amazement.

“Nail broth,” he said, stirring the water
with the wooden spoon.

“This is something about which the poor
should know,” she said, “and I wish to learn
how to make it.”

So the old woman stood very close and
watched very carefully. Pablo stirred and
stirred the nail in the boiling water. “This
usually makes good broth,” he said,
“but this time it will be thin because I
have used the same nail all week. If only
I had a handful of oatmeal to put in it,
that would help.” He sighed loudly.
“But what one does not have one must not
think about.”

“Perhaps I have a little oatmeal in the
kitchen,” said the old woman. She went
there and came back with a bowl full of the
finest oatmeal.

“Thank you,” said Pablo. He put
the oatmeal in the boiling water. He
stirred and stirred. The old woman stared
watchfully. “Soon the soup will be ready.
It will be good. But if only we had a few
onions it would be almost good enough for
guests.” He sighed loudly. “But what
one does not have one must not think about.”

“Perhaps I can find a few onions.”
The old woman went to the kitchen. She
came back with many small onions.

"Dankon," diris Pablo. Li metis la bulbojn en la bolantan akvon. Li kirlis kaj kirlis. Post kelkaj minutoj li diris, "Nun ĉi tio estos tre bona, sed se nur ni havus kelkajn karotojn kaj iom da celerio, kaj da viando, tiam ni povus inviti la Reĝon mem manĝi kun ni."

Pablo sopiris laŭte. "Sed kion oni ne havas, oni devas ne pripensi."

La virinaĉo ridis gaje. "Eble mi povus trovi iom da legomoj kaj da viando." Ŝi iris denove al la kuirejo kaj revenis kun karotoj, celerio kaj viando.

Post unu horo Pablo elprenis la najlon. "La buljono estas preta," li diris.

"Kun tia bona buljono, ni devus havi ĉion konvena," diris la virinaĉo. Do ŝi metis blankan kovrilon sur la tablon. Poste ŝi iris al la kuirejo kaj trovis panon kaj fromaĝon. Pablo kaj ŝi faris bonan festenon. La virinaĉo manĝis ĝis ŝi estis tute sata.

"Mi neniam manĝis tiel bongustan buljonon," diris ŝi. "Kaj pensu, buljonon faritan el rusta najlo!"

Post la manĝaĵo, Pablo volis dormi sur la planko, sed la virinaĉo diris, "ne ne." Ŝi metis freŝajn littukojn sur la liton en la gastĉambro kaj pablo dormis tie.

La postan matenon ŝi donis al Pablo bonan matenmanĝon. Kaj kiam li eliris ŝi diris, "Dankon pro la leciono. Nun mi loĝos tre komforte ĉar mi scias fari najlan buljonon."

"Thank you," said Pablo. He put the onions in the boiling water. He stirred and stirred. After a few minutes he said, "Now this will be very good. But if only we had some carrots and some celery and some meat, then we could invite the King himself to eat with us."

Pablo sighed loudly. "But what one does not have one must not think about."

The old woman laughed gaily. "Perhaps I can find some vegetables and meat." She went again to the kitchen and came back with carrots, celery and meat.

After an hour, Pablo took out the nail. "The stew is ready," he said.

"With such good broth we must have everything nice," said the old woman. So she put a white tablecloth on the table. Then she went to the kitchen and found bread and cheese. Pablo and she had a good feast. The old woman ate until she could eat no more.

"I never ate such good stew," said she. "And think of it, stew made from a rusty nail!"

After the meal, Pablo wished to sleep on the floor but the old woman said, "no, no." She put fresh sheets on the bed in the guest-room and Pablo slept there.

The next morning she gave Pablo a good breakfast. And when he was leaving she said, "Thank you for the lesson. Now I shall live very comfortably because I know how to make nail broth."

Korespond - Anoncoj

Ni presas, sube, la nomojn de personoj kiuj deziras korespondi kun Usonanoj. Post kelkaj estas, en parentezo, speciala informo: ekz. la aĝo de la korespondanto, specialaj deziroj, kc.

Bulgario: Borislav Stanĉev, Str. Doiran 4, Tolbuhin. (48-jara)

Pier Hristov, ul Sopot 39, Sofia 10.

Vasil D. Velĉev, str. Partizanska 16, Gabrovo. (21-jara)

Peio Georgiev, Okr. Loveŝki, Goliam-Izvor. (20-jara sportisto.)

Blaga Jordanova, Str. Petro Karavelov 10, Tolbuhin. (24 jara instruistino)

Ĉeĥoslovakio: V. Trojovský, Stojanovo n.7, Ostrava III.

F. Kastner, Str. Slovanská 199, Plzen.

R. Korous, Str. Papírnická 2, Plzen.

Jiri Vaŝinka, Baŝka 145, okr. MĚstek. (Kun fotografistoj)

Rudolf Skalický, Ostrava VII - Vitkovice, MĚstecka ul. 94

Josef Rind, Baŝovice 99, p. Malé Svatoňovice.

Frant Krbwšek, Tisnov II, Palackého 201

Lad Filka, Bezručova 731, Kuřim u Brna.

Jaroslav Kosič, Dětenice 104.

Danlando: Bebel Sorensen, Gemelgaarsvej 31, Farum. (Kun tipografistoj)

Francio: Monique Gauthier, 20 rue de la République, Talence.

Germanio (DDR): Siegfried Bergmann, Dresden A29, Klopstockstr. 52.

Hungario: Ernesto Ladmann, Bocskai sor 162, Esztergomtábor, Komárom m.

Julio Fekete, Mikes u 10, Budapest XIX.

Indonezio: Sri Soedono Pr., Djl. Surjoputran 41, Jogjakarta. (Kun filatelistoj)

Lie Djing Hwee, Kongbi-lama 110, Yogia-Djateng. (19-jara)

Italio: Giovanni Della Savia, Via Monte Focobon 8, Favaro Veneto (Venezia). (Interŝanĝi poŝtmarkojn kaj sigelmarkojn, kvanton kontraŭ kvanto.)

Celestine Trombetti, Via XXV Aprile, Castenaso, Bologna.

Egle Dalla Valle, Via S. Vitale 62, Bologna. (Kun 13-15 jaruloj)

Japanio: Isao Yamamoto, WB 31, 290 Tsuije-cho, Akishima-Tokyo.

Hidehiko Ŭŝijima, 4-1986 Ŭbunŝa-Ryjo, Simootiai Ŝinjuku-ku, Tokyo.

Hisako Fukuda, Mitani 3514 Inami-cho, Kako-cun, Hjogo-ken, Takasago.

Kayoko Snibutani, Kako 3352al Inamo-cho, kako-cun, Hjogo-ken, Takasago.

Secuko Hayaŝi, 32-3 Macunami-cho, Takasago.

Mieko Yamoto, 54-3 Macunami-cho, Takasago.

Tamocu Miyamori, 1119 Uohashi Amida, Takasago.

Yoŝinisi Hamatani, 227 Inozaki, Ino-cho, Takasago.

Masaharu Terawaki, Higashi-Hiararu Yonada, Takasago.

Norikazu Hamatani, Takasu, Ino-cho, Takasago.

Ryozi Inoue, 1104 Nisi Iho-Cho, Takasago.

Asao Sumimoto, Nisi Icho-Cho, Takasago.

Yuŝiro Nara, Niŝihata 625, Takasago.

Yukiko Irie, 226-2 Ino-cho, Takasago.

Yosijasu Sasaki, Shimizu-cho 1433, Takasago.

Miĉiko Kuraki, 532 Imazu-cho, Takasago.

Jugoslavio: Strašek Bogomir, Ratanska vas 15, Rogaška Slatina, Slovenia.

Pantiĉ Krešo, Slavonska Požega, Primorska 34. (12-jara knabo)

Nikola Sustiĉ, Viadukt, Gorican Hrvatska. (26-jara viro)

Kanac Ivan, Glavna Kružna 55, Zagreb V.

Nikola Goliĉ, Trojstvo, Hrvatska.

Kanado: Bruno Samson, 5037 Christophe-Colomb, Montreal, P.Q.

Nederlando: N. Bras, Toussaint Kade 3, Hague. (50-jarulino)

Polio: Kazimierz Zurawski, ul. Ostro/ecka 1, Przemysl. (20-jara studento.)

Adam Ciszewski, Gdansk Wrzeszcz, str. Hibnera 1c, DS. 3.

Svedio: W. Halvarsson, Nya Tanneforsv. 19, Linköping.

Unio de Sovietiaj Socialistaj Respublikoj (USSR): Kárlis Dzintars, Unijas 83-8, Riga 39, Latvio.

E. Nikitin, Box 7, Kishinev-Centre, Moldavia Respubliko. (Interŝanĝi librojn)

Stanislav Poniŝkaitis, Ŝiluliai 2, Spartuoliij 27, Litova SSR. (Interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn)

Bruno Keava, Talsos, Laidresstr, 11, Latvia SSR.

Viktor Aksionov, Str. Gorkio 12-8, Kaunas-14, Litova SSR. (16-jara. Interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn)

Usono: Robert F. Brewer, 2615 Nottingham Rd., Bethlehem, Pennsylvania. (Pri tradukado de probablec-statistikoj en esperanton, kaj aplikado de esperanto al maŝinlogiko.)

Vietnamio: T Tēnh-Trong-Côn, 54 Quang-Tennig, Str. Hà Đông. (Kun gejunuloj)

Sender:
ESPERANTO PRESS
Oakville, Ontario, Canada

Return and Forwarding Postage Guaranteed



the talk of the world

The ability to speak another language is a valuable cultural asset. Unfortunately, it is almost impossible to *really* learn a foreign tongue without actually living where it is spoken. It is possible, however, to learn the *international language*, ESPERANTO, at home, without a teacher, and with no equipment other than a simple text-book.

Esperanto uses the same word material as English and other modern tongues, but in so simplified and regular a form that one can master it in a small fraction of the time spent to obtain a mere smattering of any national language. Students have written us in perfect Esperanto after only a few weeks of study!

Esperanto is perfectly phonetic — each letter has a single invariable sound. Accent is always on the next-to-last syllable. The grammar has but sixteen simple rules, with no exceptions. Words are self-identifying: nouns end in "o", adjectives in "a" and adverbs in "e". Word-building by the systematic use of affixes expands Esperanto's modest basic vocabulary into the world's most precise and expressive language!

For a sample copy of one of the many periodicals printed in Esperanto, and a home-study text-book from which one can learn to read, write and speak the international language, send 25 cents to

ESPERANTO, 328 West 46th Street,
LOS ANGELES 37, Calif.

Millions of people already use Esperanto and have correspondents and *friends* the world over! Esperanto programs broadcast by the Voice of America over its entire network brought replies from Esperantists in eighty-six countries.

Many literary and technical works may be had in Esperanto translations, but there is also a vast original literature, and Esperanto periodicals are published in nearly every country.

The United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization (UNESCO) has recognized that Esperanto facilitates person-to-person contacts and thus furthers its own cultural and educational aims. In 1954 UNESCO invited the Universal Esperanto Assn. (our world headquarters) to become a consulting associate.

Several countries have issued postage stamps commemorating Esperanto or its author. Esperantists even have their own coinage, and a form of paper money for small payments abroad. An annual World Congress draws three to four thousand Esperantists from forty or more countries for a week of business and social meetings that require no interpreters!

In the U.S., Esperanto is promoted by the Esperanto League for North America and its magazine, *The North American Esperanto Review*. For more information write to ESPERANTO LEAGUE, Meadville, Penna., or to:

Ĉi tiu flugfolio estas havebla kiel folieto de Donald Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37, California.

Prezo: 10¢ por 30 ekzempleroj
30¢ por 100 ekzempleroj